# *Debato polemika: la kuba registaro pritaksas la salajran situacion*



Havano, 31 jul (RHK) La ?enerala sekretario de la centralo de kubaj laboristoj, CTC, Ulises Guilarte de Nacimiento, klarigis al la gazeto Granma, ke pri la salajro ekzistas debato en la kuba socio tre vasta, kaj majoritata rekono pri tio ke la enspezoj ricevataj ne kontentigas la bezonojn de la gelaboristoj, kaj pri tio la sindikatoj koincidas.

Tia situacio provokas apation en la laboro, malinteresi?on kaj gravan migradon laboran kun sekvoj ne nur kvantaj sed anka? kvalitaj. Tiu ?i afero estas konata kaj la organoj kiuj devos decidi, pritaksas ?in.

Krom tio, li aldonis, persistas nepagoj al laboristoj kaj institucioj administraj kiuj perfortas la pago-periodojn, kaj entute, ekzistas problemaro ligita al la temo de la salajro, dum ni ?iam defendas ke oni pagu tion kio havas produktivan subtenon.

Se okazus male, tio havus inflacian sekvon en la ekonomio, tial, la sindikatoj havas la defion plibonigi la trejnadon de tiuj kiuj devas koncepti, dezajni kaj ekfunciigi la formojn kaj pagosistemojn.

La tuta problemaro kaj la rolo de la sindikatoj kiel aktiva forto en la socio, la plibonigo de la ekonomiaj indikiloj, altigo de la salajroj kun produktiva subteno, tio estas per la kreado de ri?a?oj, la efikeco en la

investoj kaj la produktada kresko kaj plibonigo de servoj, ili ?iuj estas demandoj de la ?iutaga agendo. Pri ili la laborista sindikarestro parolis kun ?urnalisto de la kuba gazeto Granma.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/136896-debato-polemika-la-kuba-registaro-pritaksas-la-salajran-situacion

**Radio Habana Cuba**